Poste la voĉo de l' Kuniklo diranta tutsole: "*Kaptu lin, vi ĉe la barilo.*" Sekvis unumomenta silento kaj fine alia konfuza voĉaro:

"Subtenu la kapon—Brandon. Ne sufoku lin—Kio al vi okazis, kunulo—Diru al ni—"

Aŭdiĝis responde tre malforta sibla voĉo ("jen la voĉo de Bil" pensis Alicio).

"Nu, apenaŭ mi scias—ne pli, dankojn—jam mi refortiĝas—mi estas tro konfuzita por rakonti — io — kvazaŭ risorte—atakis min—kaj mi pafiĝis supren kiel raketo—jen ĉio."

"Tute vere, ni ja vidis vin" diris la aliaj.

"Ni devas ekbruligi la domon" diris la voĉo de l' Kuniklo. Alicio tuj ekkriis kiel eble plej laŭte "se vi tion atencos, mi instigos kontraŭ vi *Dajna'n.*"

Sekvis tuja kaj plena silento. "Kion nun ili faros?" pensis Alicio. Laŭ ŝi la plej prudenta rimedo estus forpreni la tegmenton.

Post unu, du momentoj denove komencis ĉirkaŭmoviĝo, kaj la Kuniklo aŭdigis sin dirante: "Sufiĉos por komenco unu plena puŝĉaro."

"Plena puŝĉaro da kio?" pensis Alicio. Tiu dubo ne daŭris longe, ĉar en tiu sama momento, enŝutiĝis tra la fenestro, kun kvazaŭ-hajla bruo, amaso da ŝtonetoj, kaj kelkaj el ili eĉ frapis al ŝi la vizaĝon. Ŝi diris al si: "Tion mi tuj ĉesigos" kaj aldonis laŭte: "Se vi ree faros tion, mi *Dajna'n.* . . ."

Denove la tuja kaj plena silento!



Alicio surprize rimarkis ke l
antaj sur la planko ĉiuj ŝanĝiĝa
kaj venis en sian kapon la feli
manĝos unu el tiuj kuketoj, nep
*iuspeca* korpŝanĝo, kaj ĉar nun t
povas kreskigi min, sekvas ke
malkreskiga."

Ŝi do englutis unu, kaj kun g
statis ke ŝi tuj komencas malkre
ŝi estis sufiĉe malalta por trai
forkuris el la domo, kaj trovis
da malgrandaj birdoj kaj besto
atendante ŝin. La kompatinda
en la mezo subtenate de du kob
al li trinkaĵon el boteleto. Ĉ
Alicio, sed ŝi forkuris kiel eble
baldaŭ trovis sin staranta sel
arbaro.

"Kaj nun" diris al si Alicio
en la arbaro "la unua celo ko
rekreski ĝis la ordinara grand
estas trovi la vojon en tiun bela

Sendube tre bona plano! sed,
ne havis eĉ la plej malgran
maniere ŝi devos plenumi ĝin.
esploris inter la arboj, akra h
ŝian atenton.

Jen grandega hundido de alte
el grandaj rondaj okuloj, kaj n

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI